

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

## La rilato inter la Freinet-pedagogio kaj la lingvo-lernado

**Por:** Mónika Molnár[29]

esperanto_momix@yahoo.it

### Rezumo

Pedagogio, edukado, lernejo, lernejaj sistemoj kun siaj avantaĝoj kaj/aŭ la maloj... Jen ĉiam aktualaj temoj en la homa socio. La temo ĉiam aktualas, ja temas pri la preparo de la futura generacio, kiu prenos nian lokon. Kiajn posteulojn ni ŝatus havi post ni? La tasko de la lernejo devus esti akompani la infanojn al la malkovro de siaj "geniecoj" kaj prepari ilin al la vivo. Kion oni povus fari por plibonigi la kondiĉojn de la gelernantoj, por atingi, ke la scio-akiro estu vola, volonta kaj ne deviga afero, ke la lernitaĵoj havu sencon? Ĉu oni vere devas ĉiam elpensi ion novan aŭ sufiĉus preni iun ekzemplon, kiu funkcias kaj unue analizi, kompari, kompreni la kialojn, due vidi kiel ili aplikeblas surloke? Dum la historio ekzistis pluraj sekvindaj pedagogoj, kiuj alportis ion al la civilizacio, sed pri kiuj oni pli-malpli forgesis en la granda serĉado de novaj metodoj. Unu el ili estis Célestin Freinet. Unu el liaj ĉefaj celoj estis, ke la gelernantoj estu aktivaj aktoroj de siaj lernadoj. Tamen, kiel li ligiĝas al Esperanto? Multaj forgesas aŭ eĉ ne scias, tamen jes, li uzis Esperanton en sia klaso. Konvinkiĝinte pri ĝiaj avantaĝoj, li korespondigis siajn gelernantojn por malkovrigi al ili la mondon. Inter la ĉefaj celoj de Freinet - simile al Zamenhof - estis la transdono de toleremo, respekto, dialogo, kunlaboro. Li volis, ke la infanoj rimarku, kiumaniere kun alilandaj infanoj ili estas samtempe similaj kaj tamen tute diversaj. Ĉu 100-jara pedagogia movado estas nepre malmoderna? Lia pedagogio estas orminejo por tiuj, kiuj kapablas kompreni kaj apliki ĝin! Unu el tiuj malmultaj lokoj, kie hodiaŭ estas praktikata tiu ĉi pedagogio, estas nia lernejo "La Granda Ursino" (Ecole de La Grande Ourse) en Svislando. Ni sekvas la spurojn de Freinet daŭre klopodante aŭ inventi, aŭ plibonigi, adapti manierojn je la servo de la gelernantoj, kiel Freinet mem faris tion siatempe.

---

[29] – Diplomita instruisto pri Informatiko, Italaj lingvo kaj literaturo, kino-pedagogio, Esperanto kaj interlingvistiko, regula kunlaboranto de la revuo «Juna Amiko», de la porinstruista retpaĝaro edukado.net kaj rajtigita ekzamenanto por la KER-ekzamenoj. Vivas aktuale en Svislando, kie de pluraj jaroj ŝi instruas en la svisa lernejo "La Grande Ourse", i.a. ankaŭ Esperanton al 6-16 jaraj gelernantoj. Praktikas la Freinet-pedagogion kaj aparte interesiĝas pri la lingvolernado tra studoj kaj eksperimentoj.



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

**Ŝlosilvortoj:** Esperanto; Freinet-pedagogio; Lingvolernado; Ludo; Taksonomio de Bloom.

***Resumo***

*Pedagogia, educação, escola, sistemas escolares com suas vantagens e/ ou desafios ... Estes são sempre problemas atuais na sociedade humana. O tema está sempre presente, é a preparação da geração futura que ocupará o nosso lugar. Que sucessores gostaríamos de ter depois de nós? A tarefa da escola deve ser acompanhar as crianças para a descoberta de seus "gêneros" e prepará-los para a vida. O que poderia ser feito para melhorar as condições dos alunos, para garantir que o conhecimento seja voluntário, voluntário e não obrigatório, que a aprendizagem seja significativa? Você realmente precisa inventar algo novo ou suficiente para tomar algum exemplo que funciona e primeiro analise, compare, compreenda os motivos, veja como eles podem ser usados localmente? Durante o curso da história, havia vários educadores de acompanhamento que trouxeram algo para a civilização, mas dos quais mais e menos foram esquecidos na ótima busca de novos métodos. Um deles foi Célestin Freinet. Um dos principais objetivos era que os alunos deveriam ser atores ativos de sua aprendizagem. No entanto, como ele se conecta ao esperanto? Muitos não esquecem nem mesmo não sabem, mas sim, ele usou Esperanto em sua classe. Tendo convencido suas vantagens, ele correspondia com seus geladores para descobrir o mundo. Os principais objetivos de Freinet - como Zamenhof – foram partidários da transmissão de tolerância, respeito, diálogo, cooperação. Ele queria que as crianças percebessem, no caminho de crianças estrangeiras, que elas são ao mesmo tempo semelhantes e ainda bem diferentes. O movimento pedagógico de 100 anos é necessariamente moderno? Sua pedagogia é um grande negócio para aqueles que podem compreendê-lo e aplicá-lo! Um desses poucos lugares, onde esta pedagogia é praticada hoje, é a nossa escola "The Great Bear" (Suíça). Seguimos as faixas de Freinet para continuar a tentar, inventar ou melhorar, para adaptar as formas de serviço dos alunos, como o próprio Freinet fez ao mesmo tempo.*

***Palavras-chave:*** *Esperanto; Freinet-pedagogia; Aprendizagem de línguas; Jogo; Taxonomia da Bloom.*

***Abstract***

*Pedagogy, education, school, school systems with their advantages and / or the challenges ... These are always current issues in the human society. The theme is always present, it is the preparation of the future generation that will take our place. What successors would we like to have after us? The task of the school should be to*



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

*accompany the children to the discovery of their "genres" and to prepare them to life. What could be done to improve the conditions of the students, to ensure that knowledge is voluntary, voluntary and non-compulsory that the learning should be meaningful? Do you really have to invent something new or enough to take some example that works and first analyze, compare, understand the reasons, to see how they can be used locally? During the course of history there were several follow-up educators who brought something to civilization, but of which more and less were forgotten in the great search for new methods. One of them was Célestin Freinet. One of his main goals was that the students should be active actors of their learning. However, how does he connect to Esperanto? Many do not forget or even do not know, but yes, he used Esperanto in his class. Having convinced her advantages, he corresponded his gelators to discover them the world. Freinet's main goals - like Zamenhof - were the transmission of tolerance, respect, dialogue, cooperation. He wanted the children to notice, in the way of foreign children, they are at the same time similar and yet quite different. Is 100-year-old pedagogical movement necessarily modern? His pedagogy is a great deal for those who can understand and apply it! One of these few places, where this pedagogy is practiced today, is our school "The Great Bear" (Switzerland). We follow Freinet's tracks to continue to try or invent, or improve, to adapt ways to the service of the students, as Freinet himself did at the same time.*
***Keywords:*** *Esperanto; Freinet-pedagogy; Language learning; Game; Taxonomy of Bloom.*

> «… per bona vorto eduku, permesu ankaŭ la ludon
> al via bela, serioza filo!»
> (Attila József: Aeron!)

Pedagogio, edukado, lernejo, lernejaj sistemoj kun siaj avantaĝoj kaj/aŭ la maloj... Jen ĉiam aktualaj temoj en la homa socio. Estus sekurige aŭdi pri pozitivaĵoj koncerne la instru-sistemon, sed bedaŭrinde pli multas kritikoj. La temo ĉiam aktualas, ja temas pri la preparo de la futura generacio, kiu prenos nian lokon. Kiajn posteulojn ni ŝatus havi post ni? Ĉu senpripensajn obeemulojn? Ĉu furiozajn ĉion-

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

kontraŭulojn? Ĉu programitajn robotojn? Ĉu malordajn revulojn? Ĉu senentuziasmulojn, kiuj eĉ se komencos ion, eble neniam finos ĝin? Aŭ ĉu konsciencajn, toleremajn kunlaborantojn, kiuj respektas la aliajn kaj sian ĉirkaŭaĵon? Evidente, ĉiuj ŝatus havi ĉi-lastajn, sed ĉu ankaŭ praktike niaj eduk-metodoj, eduk-sistemoj iras en tiun direkton?

La tasko de la lernejo devus esti akompani la infanojn al la malkovro de siaj "geniecoj" kaj prepari ilin al la vivo. Kion oni povus fari por plibonigi la kondiĉojn de la gelernantoj, por atingi, ke la scio-akiro estu vola, volonta kaj ne deviga, suferiga afero, ke la lernitaĵoj havu sencon? Ĉu tiu celo estas realigebla aŭ nur utopia deziro? Tio eblas, jen mia persona konvinkiĝo.

Por ties atingo baze necesus, ke la infanoj volonte iru en la lernejon. Afero, kiu devus esti grava por ĉiuj koncernatoj, tiom por la gepatroj kaj por la instruistoj, kiom por la infanoj mem. Unu el la problemoj estas, ke la lernejo – almenaŭ en ĝia nuna formo – ne estas alloga por la gelernantoj. Dankon al la esceptoj, ĉar tiuj kompreneble ekzistas, sed ili tiom malmultnombras, ke tio statistike estas sensignifaj. Kiuj faktoroj kontribuas al tiu ĉi situacio? Unu el ili estas la troigo diversterene. Fizike: la pezo de lernejanaj tornistroj povus konkursi kun halteroj de sportisto. Spirite: la lernrapideco pli konvenus al gajnonta kursĉevalo ol al lernejano ĵus enironta la mondon de la scioj. Home: la kunlaboro kaj la reciproka helpo baldaŭ iĝos nekonataj esprimoj en medio, kie gajnas tiu, kiu piedumas la aliajn por montri sian superecon. Bedaŭrinde tiu ĉi aspekto estas plifortigita eĉ fare de la instruistoj, de la institutoj mem – eĉ se nekonscie – per la sistemo de notoj, poentoj, konkursoj je ajna prezo. La lernenda materialo pligrandiĝas de jaro al jaro, ni volas ĉion pli kaj pli frue komencigi per la gelernantoj, kvankam nek la cerbokapablo de la lernejanoj grandiĝas proporcie kun tio, nek la tagoj, semajnoj, monatoj estos pli longaj. Do, por



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

solvi la problemon, oni multobligis la potagajn lecionojn kaj kio eĉ tiel ne fareblas lerneje, tio farendas hejme kiel hejmtasko. Post la longaj lernejaj tagoj la gelernantoj alvenas hejmen sufiĉe elĉerpite, do kiun utilon povas havi la hejmtasko en tiaj kondiĉoj? Ni konfesu, ke ne multon. Malmulton … aŭ eĉ malpli ol tion. Kelkaj faros ilin rapide, rutine, kio samtempe signifas ankaŭ tion, ke ili ne vere bezonus tion, lernis nenion el tiuj ekzercoj, ja tiuj lernejanoj jam sciis fari ilin. Aliaj laceguloj tiom multe suferas nekomprenante la taskojn, ke ili sekvonttage iros lernejen aŭ sen faritaj hejmtaskoj, aŭ kun hejmtaskoj … faritaj de la gepatroj, kiuj tute simple ekkompatis la mortlacan, ploretantan infanon. Do, en kiu okazo la hejmtasko atingis sian edukan celon? Konklude la rolon de la hejmtaskoj ni povas konfesi, ke ili servas nur por okupi la infanon postlerneje, tiel malhelpante ilin sporti, muzikumi, okupiĝi pri artaĵoj aŭ simple senkateniĝi kaj iri kuri, ludi en la ludejo kun geamikoj.

«La troigita ekzercado ne progresigas, nur kontraŭstarigas la lernanton al la lernmaterialo.» (Szendi 2017)

Sed! En tiu momento intervenas la celkonsciaj gepatroj, laŭ kiuj jes ja bezonatas, ke postlerneje la infanoj sportu, muzikumu, frekventu diversajn fakrondojn eĉ je la kostoj de tiom plen-plena horaro, kian nur malmultaj plenkreskuloj eltenus. Sed ili estas junaj, plenaj je energio, ili eltenos tion por iom da tempo. Sed por kiom da tempo? Kaj ĉu vere ĉiuj? Bedaŭrinde oni facile forgesas pri tiuj, kiuj ne kapablas sekvi tiun rapidecon. Kio pri ili? Kiu repiedstarigos ilin? Kuraĝigu ni ilin, ja ĉiuj bezonas tion. Sed, ĉu la kuraĝigo povas ankoraŭ efiki ĉe infano, kiu kumulas nur fiaskon post fiasko? Cetere multo dependas ankaŭ de tio, kion ni nomas kuraĝigo. Jen ekzemplo de bonintenca, sed tute maltrafita kuraĝigo. Steĉjo ne aparte elstaras je skiado (aŭ je io ajn), kvankam la gepatroj elspezis multon por ebligi tiun sporton al li. Steĉjo estas frustrita,

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

la gepatroj same. Li absolute bezonas kuraĝigon. La gepatroj serĉas la plej efikajn argumentojn: «Ne ploru kaj ne ĵetu teren viajn skibastonojn (aŭ ion ajn)! Rigardu tiun blumantelulon, li falas multe pli ol vi, kaj rigardu kiel ridinde li tenas sin! Haha, vi estas mil foje pli bona ol li, do ĉesu ploraĉi!» Ho, kiom «elstara» kuraĝigo (kaj bona komenca puŝo al mokado, kontraŭsociiĝo kaj eĉ al prifajfado de la infanaj rajtoj)!

Por eviti tion, ideoj kaj pedagogiaj direktoj fakte ne mankas, sed ĉu oni vere devas ĉiam elpensi ion novan nome de la modernigo, aŭ sufiĉus preni iun ekzemplon, kiu funkcias kaj unue analizi, kompari, kompreni la kialojn, due vidi kiel ili aplikeblas surloke? Dum la historio ekzistis pluraj sekvindaj pedagogoj, kiuj alportis ion al la civilizacio, sed pri kiuj oni pli-malpli forgesis en la granda serĉado de novaj metodoj. Unu el ili estis Célestin Freinet, franca pedagogo (1896-1966).

Freinet siatempe kreis sian pedagogion ne ĉar ne ekzistis alia, sed ĉar li troviĝis en specialaj kondiĉoj. Unu el liaj ĉefaj celoj estis, ke la gelernantoj estu aktivaj aktoroj de siaj lernadoj. Por tio bezonatas redoni la plezuron de la laboro, doni sencon al la scioj. Fama frazo de Freinet – konata jam de Konfuceo: «Mi aŭdas kaj mi forgesas. – Mi vidas kaj mi rememoras. – Mi faras kaj mi komprenas».

Fakte, farante ion kun entuziasmo, nia komprenkapablo multobliĝas kaj ni lernas sen ajna fortostreĉo. Ofte ni eĉ ne rimarkas, ke ni ja efektive lernas, tiom natura ĝi estas. Freinet tre frue ne nur rimarkis tion, sed ankaŭ eluzis ĉiujn okazojn, kiuj doniĝis. Se la afero funkciis jam tiam, kial ni faras nenion por ke la gelernantoj havu emon lerni, por igi la lernadon io ĝojiga, alloga, luda? Jes, ankaŭ luda! La infanoj – tiom la etaj kiom la grandaj – ŝatas ludi. Do, kial ni ne ebligas al ili fari la komencajn paŝojn ludante (per ludoj kaj lude)?

Atenton! La akcento estas sur la komencaj paŝoj kaj sur la ludoj.

La komencaj paŝoj signifas la enkondukon, la apetit-venigilon, kia estas



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

aperitivo. La rolo de aperitivo estas veki la apetiton, ĉar ekde kiam la apetito ĉeestas, ni ĉiuj volonte manĝos sen devigi nin, aŭ pli malbone, sen ke iu devigu nin manĝi. Post manĝo la digestado (en sana korpo) okazas jam tute nature, memstare, sen bezono de iu ajn plusa interveno. Simbole (ankaŭ) tia estas la Freinet-pedagogio.

Per «ludoj» mi aludas al la progresigaj, konstru-kapablaj ludoj, kiuj prefere ludindas plurope kaj tute ne al detruaj, agresemaj, dependecon kaŭzaj (jes ja, grava punkto!) videaĵoj. Mi parolas pri «ludoj», kiuj ne disigas, sed male, kunligas la infanojn. «Ludoj», en kiuj ne ekzistas bonaj kaj malbonaj, lertaj kaj mallertaj, gajnantoj kaj perdantoj. Temas pri ludoj, per kiuj nur gajni eblas, kiujn eblas ludi ankaŭ sola, sed kiu pli rapide progresigas nin, se ni kunlaboras kun la aliaj. Ju pli rapide ni antaŭeniras, des pli amuza ĝi fariĝas. Ju pli amuza ĝi fariĝas, des pli kreskas nia emo antaŭeniri ktp. ĝis elformiĝas iu «diabla cirklo», kie – por unu foje – «diabla» havas pozitivan signifon.

> «Hej, Oldulo, kio plej bonis? – Ludi.
> Kaj poste? Lasu l'infanaĝon! – Ludi.
> Deziri la vastan mondon? – Ludi.
> Prepariĝi al sanktaj bataloj? – Ludi.
> Forviŝi larmojn d'aliuloj? – Ludi.
> Ĝoji pri viaj infanoj? – Ludi.
> Kredi en vi mem? – Ludi.
> Se ne, en la momento? – Ludi.
> Malŝpari vinon, monon, virinon? – Ludi.
> Lukti kontraŭ Dioj? – Ludi.
> Ĉieleniri kun poetoj? – Ludi.
> Kaj al mirakloj, ajnaj? – Ludi.
> Ĉu vi entuziasmis? – Ludi.
> Jen ĉio? Nur tiom? – Ludi.
> Sufiĉas. Alion mi volas - … ludi!
> Kaj kredas, ke neniam mi devos - …muti! …»
> (Lőrinc Szabó: Ludi)

Ĉu 100-jara pedagogia movado estas nepre malmoderna? Lia pedagogio

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

estas orminejo por tiuj, kiuj kapablas kompreni kaj apliki ĝin! Unu el tiuj malmultaj lokoj, kie hodiaŭ estas praktikata tiu ĉi pedagogio, estas nia lernejo "La Granda Ursino" (Ecole de La Grande Ourse) en Svislando. Ni sekvas la spurojn de Freinet daŭre klopodante aŭ inventi, aŭ plibonigi, adapti manierojn je la servo de la gelernantoj, kiel Freinet mem faris tion siatempe. Kompreneble li ne estis la sola, kiu havis tiajn ideojn kaj serĉis realigi ilin. Jen kelkaj opinioj de diversterene famaj homoj, kies diroj tute bone povus karakterizi ankaŭ la ideojn de la Freinet-pedagogio:

«Bona lernejo demandas ne tion «ni vidu kion vi ne scias», sed tion «kion vi scias» laŭ viaj personaj kapabloj (kaj laŭ la almenaŭ 8 diversaj inteligentoj).» (Tamás Vekerdy – Szabó 2012)

«En la instruado ne povus ekzisti diferencigo.» (Konfuceo 2017)

«Tio, kio gravas, estas la spirita malsato, ĉar ĝi restos dum la tuta vivo. Kiam mi finas la lernadon, finas la universitatajn studojn, tiam ĉiuokaze mi forgesos ĉion (…) Tio, kio restas, estas la spirita malsato.» (Albert Szent-Györgyi – Kardos 1984)

Mi povus doni ekzemplon el iu ajn instrutereno, analizante tion el la vidpunkto de niaj instrumetodoj, sed se mi elektas la ofte timigan kaj por multaj fifaman lingvo-lernadon, kaj tio ne estas hazardo. Ĉi-terene ne mankas al mi personaj spertoj, tiom pozitivaj, kiom negativaj. Same estas konscia elekto paroli pri «lernataj lingvoj» anstataŭ la kutimaj «fremdaj lingvoj», ja la vorto «fremda» en si mem elvokas jam negativajn sentojn. Tio malĝustus, ja ĉiuj lernataj lingvoj kontribuas al la intelekta formado kaj al la kultura riĉeco de la individuo, pro tio ĝi eĉ ne devus esti iu lerneja branĉo, sed simple parto de nia vivo.

Parolante pri lingvolernado, la plej grava demando devus esti ne tiu, kiun lingvon ni lernu/instruu, ja ĉiuj lingvoj estas (devus esti) samrangaj kaj samvaloraj,

2018 – Ano IV – Volume IV – Número XIV ISSN – 2358-7482

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

sed tiu, kiu lingvo estu la unua! Estas sciate, ke la plej malfacila lingvo estas la unue lernata, ja estas ĝi, kiu devigas nin forlasi nian komfort-zonon, alfronti aliajn vortojn, esprimojn, kulturojn, homojn. La defio estas jam sufiĉe granda en si mem, sed ni pligravigas la situacion per niaj elektoj koncerne la unue lernatan lingvon. La problemoj diferencas depende de la lernota kaj de la elira lingvoj, sed la baza problemo restas la sama: devi esprimi sin en alia lingvo ol la nia. En multaj mondpartoj la angla, la germana kaj eble ankoraŭ la franca estas konsiderataj kiel popularaj, laŭmodaj lingvoj por lerni. Veras, ke la konjugacio de la angla ne estas tre peniga (almenaŭ tre baznivele), sed multaj eĉ ne atingas la ŝtupon povi ĝoji pri tio, ĉar la prononcado jam amarigis ilian vivon. En la germana la prononcado ne kaŭzus problemon, sed oni ofte eĉ ne atingas la nivelon de la komplikaj verbotempoj, ja oni stumblas jam ĉe la fama triopo de la *der-die-das*. Por multaj alilingvanoj estas malfacila koncepto, ke ekzemple la tablo havas genron. Tablo estas tablo, objekto sen genro, ĉar ĝi ne estas io vivanta. Koncerne la francan, la malfacilaĵoj svarmas eĉ pli: prononcado, verbotempoj, ortografio, genroj…, kvankam ĉi tie ni havas nur du genroj, tamen se ekzemple oni finfine ellernis jam, ke la tablo en la germana estas *der Tisch* kaj provas fiere utiligi tiun scion en la franca dirante *le table*, tiu fiereco rapide forvaporiĝosĉar ĝi devus esti *la table*... Sed kial provu ion ajn la lernantoj? Ilia tasko estas lerni la ĝustajn vortojn, genrojn ktp kaj punkto, fino. Jes, aplikante tiun ĉi vidpunkton, eble la lernantoj ne faros (tiom multajn) erarojn, sed ili rapide perdos sian entuziasmon al lingvolernado. Jes, entuziasmon, ĉar la plimulto havas veran emon komencante lerni ion novan, misteran kaj ili eĉ konsentos alfronti malfacilaĵojn, se intertempe iliaj penoj estas rekompencataj per sukceso-sento. Sed tiu sukceso-sento venas ne el parkerigitaj tekstoj, sed el la ĝojo, kiun donas la kreado.




IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

«En la tuta mondo, ĉie, kie mi estis, estas granda eraro koncerne la instruadon, enorma eraro. Ĉie oni kredas, ke la librojn oni devas parkerigi, iliajn enhavojn enkapigi. Laŭ mia opinio la kapo estas por pensi per ĝi, kaj la libro estas por ne bezoni ĉion enkapigi.» (Albert Szent-Györgyi – Kardos 1984)

La piramido de Bloom (la taksonomio de la celoj, Bloom 1956) bone respegulas la diversajn fazojn de la lernado kaj iliajn rilatojn, same kiel la piramido de Maslow montras la homajn bezonojn de la biologiaj, korpaj bezonoj ĝis la memrealigo. En multaj landoj la didaktikaj fakuloj volonte prenas tiun ĉi piramidon kiel bazon por konstrui la ŝtupojn de lernoprocezoj, kurs-materialoj. (Vikipedio – Taxonomie de Bloom)




Bloom (amerika edukscienca psikologo) kaj liaj kunlaborantoj distingis ses

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

diversajn nivelojn (sur la skemo desube):

1) Konoj (memorigo, nomigo, identigo, ripetado, …)
2) Kompreno (klasigo, priskribo, rekono, traduko, ...)
3) Aplikado (prezentado, planado, ilustrado, ekzercado, …)
4) Analizado (komparado, distingado, eksperimentado, testado, …)
5) Resumo/Sintezo (kunmetado, kreado, organizado, plibonigo, …)
6) Evaluado (debato, pritaksado, pruvado, taksado, …)

Multaj personoj uzis tiujn ĉi terminojn de Bloom (1956) kiel bazojn, foje proponante modifojn ĉefe pri la hierarkiaj rilatoj, fine Anderson (Universitato de Texas) kaj Kratwohl (Universitato de Michigan kaj kunaŭtoro de la origina taksonomio) proponis en 2000-2001 la nivel-plialtigon de la kreado. (Une alternative à la pyramide de Bloom 2009)

Observante la piramidon de Bloom el la vidpunkto de lingvolernado ni povas konstati, ke la lerneja lingvolernado grandparte neniam superas la du unuajn nivelojn, la plimulto de la gelernantoj (dum la lernejaj jaroj) neniam atingas la plej supran nivelon, kie ili povus ekkoni la ĝojon, la kontentigon de la kreado, kiu povus motivi ilin al la daŭrigo, al la antaŭeniro. Tiu ĉi estas la kulpo nek de la gelernantoj, nek de la instruistoj. Estas tre malfacile atingi en lernata lingvo tiun nivelon, je kiu la lernantoj povus jam memstare krei sen havi la balaston de frustrigaj eraroj, fiaskoj, kiuj forprenus ilian entuziasmon. Je naciaj lingvoj tio estas tre longa procezo, tro longa por ke la lernanto povu vidi la lumon fine de la tunelo. Dum la lernejaj jaroj ili prudente faras paŝetojn por ne fali, por ne fiaski. Bedaŭrinde malmultas tiuj, kiuj restas persistemaj eĉ en tiuj kondiĉoj. Ekzistas tiaj, sed la plimulto… Kio okazos al ili? Ili perdos entuziasmon, memfidon kaj kredos, ke ili estas maltalentaj rilate al



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

lingvoj, do ne valoras malŝpari tempon, energion kaj monon por lingvolernado. Tio ne estas por ili. Sed se tiu ĉi situacio estas la kulpo nek de la gelernantoj, nek de la instruistoj, ĉu estas tamen iu solvo?

La solvo serĉendas en la bone elektita unue lernata lingvo. La unua lingvo devus esti lernant-amika. Fonemika, kio liberigus la lernanton de la prononcaj, legaj kaj ortografiaj problemoj. Simpla kun logikaj verbotempoj, kiu aplikas la teorion de «neceso kaj sufiĉo». Oni bezonus logikan, sisteman, senesceptan lingvon, dum kies alproprigo oni devus lukti kontraŭ unu sola inhibo, kio estas la trapaso de la bariloj de la propra gepatra lingvo kaj la elturniĝo en iu alia lingvo. «Nur» tio kaj nenio pli, ja tio estas jam sufiĉe mejloŝtona paŝo. Sed ĉu ekzistas lingvo, kiu konformas kun tiuj eĉ ne tiom simplaj postuloj? Jes, ekzistas, ĝi nomiĝas Esperanto. La lingvo kiun aŭ ni ŝatas aŭ ni kondamnas eĉ sen realaj konoj. Esperanto estas la lingvo, per kiu la lernanto fulmrapide povas atingi la pinton de la piramido, per kiu eblas ludi jam post malmulte da tempo, kiun eblas rapide uzi por kreadoj, per kiu eblas rapide atingi la pli interesajn, stimulajn kapablojn. Ĉe Esperanto oni povas eviti la danĝeron de interes-perdo pro la longa lern-procezo kaj la memfid-perdon konsiderante sin lingva maltalentulo. Ĉio tio bonas kaj belas, sed kiel ni povas profiti el tio? Nur la angla lingvo havas futuron! (Ho, kia lingva ŝovinismo!) Estas klare, ke (pormomente) ne per Esperanto ni aĉetos nian flugbileton, nek per ĝi ni helpos perdiĝintan turiston (kvankam tio okazis jam), sed la esencon de lingvo donas ne tiuj ĉi komunikaj situacioj, ĉefe ne kaze de la unue lernita lingvo.

La unue lernita lingvo donas lingvajn bazojn, kiel la bekfluto donas bazajn muzikajn konojn, nemalhaveblajn por la sekvaj muzikinstrumentoj aŭ la koloraj krajonoj donas la artajn bazojn por la postaj, pli komplikaj artaj teknikoj. Esperanto povas (povus) roli kiel lingva bazo por la sekvaj lingvoj, ĉar ĝi estas fonemika,



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

sistema, simpla, senescepta lingvo kun logikaj verbotempoj kaj konjugacioj, kiu aplikas la teorion de «neceso kaj sufiĉo». Pro la fakto, ke Esperanto estas rapide lernebla, ĝi antaŭenpuŝas ankaŭ la cerban gimnastikon, ja kun ĝi la cerbo havas jam du uzeblajn lingvojn je dispono por fari komparojn, analizojn, interpretojn okaze de kontakt-estiĝo kun novaj lingvoj. Dum brita eksperimento (Springboard to language 2011) al iu klaso (A) oni instruis nur Esperanton dum 18 monatoj kaj al alia klaso (B) dum 2 jaroj oni instruis nur la francan lingvon. Dum la testado de diversaj kompetentoj, la gelernantoj devis interalie traduki longan frazon el la franca al la angla lingvoj. Tiuj infanoj, kiuj kapablis komplete kaj senerare traduki la frazon, ĉiuj estis el la klaso A, do el tiu, kiu havis nur Esperanto-instruadon kaj tute ne la francan. Pere de Esperanto ili kapablis atingi tiom altnivelan analizan kaj krean kapablon, kiu permesis al ili elturniĝi eĉ en la nekonata lingvo. (Morley 2012) Aŭ kion diri pri tiu hungara lernanto, kiu ĝis sia 18-a jaraĝo komplete fiaskis en 2 diversaj lingvoj (en la rusa kaj en la germana), 18 jaraĝe lernis Esperanton dum kelkaj monatoj je supera nivelo, 24 jaraĝe kun mencio 'elstara' akiris diplomon kiel itala lingvoinstruisto, 28 jaraĝe dum 3 monatoj lernis la francan lingvon ĝis konversacia nivelo, kelkajn jarojn poste jam en tiu lingvo instruis natursciencojn kaj apud ĉio ĉi, ŝi kapablas (se necese) baznivele elturniĝi en la angla lingvo (kapablas aĉeti flugbileton aŭ helpi perdiĝintan turiston), kvankam tiun ĉi lingvon ŝi neniam lernis. Do, kiel kompreni tion? Ĉu ŝi vere estis lingva analfabetulo kaj okazis miraklo, aŭ oni «nur» rompis ŝian memfidon per nekonvenaj lingvoinstruaj metodoj? Sed eĉ ne necesas iri tiom foren por elmontri, ke Esperanto jam tre frue kapablas doni tiom bonajn lingvajn bazojn, kiuj povas helpi eĉ en la analizado de la propra, gepatra lingvo kaj en la konsciiĝo pri ĝi. Ĝia logika strukturo helpas eĉ la akiron kaj komprenon de matematikaj konoj. Ekzemple ĝia unike genia afiks-sistemo krom la lingva

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

antaŭenigo, interese, amuze edukas la gelernantojn al logika pensmaniero. Estas trafa la konstato de Tim Morley (instruisto en la Springboard-projekto) laŭ kiu tiu ĉi sistemo estas eĉ tre ekonomia, je iuj afiksoj, kiel ekzemple je la *mal-* prefikso (kiu signifas la kontraŭon uzante kun vortoj, kie ĝi havas sencon) oni povus reklami ĝin kiel «vi pagas nur unu por ricevi du» (Morley 2012) kaj foje eĉ pli kun aliaj afiksoj. Fakte, interalie ĝuste tiu ĉi sistemo ebligas la rapidan lernadon, ĉar ĉiu lernita vorto multobliĝas sen lerni pliajn vortojn, se ni kapablas jam uzi la afiksan sistemon. Laste, sed ne balaste, Esperanto favoras la senperan kontakton kun aliaj popoloj, kulturoj, kio krom esti unu el la ĉefaj celoj de lingvolernado, povas helpi ankaŭ en la terenoj de geografio, historio, artoj ktp.

Kiel ĉio ĉi ligiĝas al la Freinet-pedagogio? Tiel, ke Célestin Freinet eĉ sen science pruvitaj eksperimentoj konsciiĝis pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kaj pri ĝiaj pozitivaj efikoj en kontaktoj kun aliaj popoloj. Pro tio li korespondigis siajn gelernantojn en Esperanto. En nia lernejo, en «La Granda Ursino», ankaŭ ni ekspluatas tiujn ĉi avantaĝojn ofertitajn de Esperanto kun vere multe da sukceso. Eĉ la plej malgrandaj lernejanoj, kiuj scias nek legi, nek skribi lernojarkomence, post tri monatoj (kvankam ili daŭre ne kapablas ankoraŭ tute bone legi aŭ skribi), ili jam lerte ĵonglas per la lingvo, ni diskutas en Esperanto kaj ili simple ludas per tiu ĉi lingvistika perlo. Kaj mi, ilia instruisto, lasas ilin ludi. Apartenas al la vero, ke dum tiuj ĉi 3 monatoj ni havas unu lingvan semajnon, dum kiu ni faras multajn diversajn aktivecojn nur en Esperanto (lingvaj ludoj, kreado kaj prezentado de skeĉoj, teatraĵetoj, verkado de rakontetoj, kuirado, aŭkcio ktp.). Ĝi estas vera lingva mergiĝo, kiel se dum tiu semajno la grupo II (grupo de la pli junaj, 6-12 jaraĝaj) fariĝus «Esperantio» mem. Kaj kion faras dum tiu ĉi tempo la grupo I (la 12-16 jaraĝaj)? La samon, sed en la germana lingvo (lingvo lernata tuj post Esperanto). Antaŭ la


IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

semajno, tiuj, kiuj ĵus ŝanĝis grupon kaj alfrontos sian unuan germanan semajnon timas iom, ke la semajno en la germana estos multe pli malfacila ol tiu en Esperanto, sed temas nur pri tio, ke ili jam forgesis, ke ili havis ekzakte la samajn zorgojn kaj demandojn antaŭ ilia unua Esperanto-semajno. Vendrede, kiam ni pritaksas la semajnon dum la lerneja konsilio, ni ofte aŭdas de la pli aĝaj: «Komence ne estis facile kaj ankaŭ nun mi ne povas ankoraŭ ĉion kompreni, sed mi sentas, ke mi multe progresis dum tiu ĉi semajno kaj mi ŝatus danki niajn instruistojn, kiuj ebligis al ni tiujn ĉi travivaĵojn.» Kaj kion diras la pli junaj? «Ĉu sekvontfoje ni povus fari la Esperanto-semajnon dum du semajnoj?»

Laŭ Freinet la rolo de la instruisto ne konsistas el vojdesegnado, kiun la gelernantoj devos laŭiri, sed el helpo al la gelernantoj, por ke ili mem trovu siajn vojojn. Ni uzas ĉiujn niajn fortojn por realigi tion, kaj mi pensas, ke laŭ la lernantaj opinioj ni kun fido povas kredi esti sur la bona vojo.

## Bibliografio

Chabrun, Catherine 2015: **Entrer en pédagogie Freinet**. Paris: Éditions Libertalia
Ecole de La Grande Ourse 1983-2018**: En bref – Comment ça marche?** – Actualité. http://www.grande-ourse.ch/
Freinet, Célestin 2017: **Une éducation du travail. In: Le Nouvel Educateur** - 234. Paris: Çava-Expressions. pp. 51-53.
Gasselin, Juliette 2009: “Vers une Méthode naturelle de Langues vivantes” *In* **Le Nouvel Educateur** - 193. Paris: ExpressionsII. pp. 53-55.
Go, Nicolas 2009: “La Méthode naturelle de Freinet” *In* **Le Nouvel Educateur** - 193. Paris: ExpressionsII. pp. 28-35.
Gyarmati Orsolya 2015: **Hagyd játszani a gyereket!** https://csaladhalo.hu/hatter/hagyd-jatszani-a-gyereket/
Kardos István 1984: **Tudósportrék**. Budapest: Kossuth Nyomda
Konfuciusz 2017: **Beszélgetések és mondások**. Budapest: Helikon
Morley, Tim 2012: **Learn Esperanto first** – TEDxGranta. http://www.youtube.com/watch?v=8gSAkUOElsg



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

Morley, Tim 2017: **Tim Morley - "Springboard to Languages**" Polyglot Gathering. https://www.youtube.com/watch?v=It-2X-dfEv4

**Springboard to Language** 2011: Project evaluation. https://www.escholar.manchester.ac.uk/uk-ac-man-scw:149504

Szabó Kata 2012: "Alattvalók iskolája - interjú Vekerdy Tamás gyermekpszichológussal" *In* **Vasárnapi hírek**, 2012. november 18.

Szendi Gábor 2017: **Szárnyakat adni**. Budapest: Jaffa kiadó

**Une alternative à la pyramide de Bloom** 2009 - Formation et e-learning. https://didac2b.wordpress.com/2009/07/07/une-autre-pyramide/

Vekerdy Tamás 2014: Iskolák?!?! - **Gyerekek, szülők és tanárok**. Budapest: Central Médiacsoport Zrt.

Vikipédia - **Taxonomie de Bloom**. https://fr.wikipedia.org/wiki/Taxonomie_de_Bloom

Vilisics Ferenc 2016: **Hagyd a gyereket játszani!** – Öt évünk a finn óvodával. http://hellomagyarok.hu/karrier/hagyd-a-gyereket-jatszani-ot-evunk-a-finn-ovodaval